

n-ro 41

junio 1993

ISSN 0941-9306

La Merkato

Gravaj informoj:

- Dum la Universala Kongreso en Valencio respondeculo de IKEF troviĝos ĉe la stando de *Monato* (Flandra Esperanto-Ligo). Tie vi povos pagi vian kotizon, peti informojn, konsulti IKEF-eldonaĵojn, ktp.
- La nova identecŝildaro estos disdonata dum la UK; al ne-ceestantaj membroj ĝi estos sendata tuj post la kongreso. Vi ankaŭ povas doni instrukcion al konatulo-kongresano ke li kunportu vian ekzempleron. Memorigo: membroj kiuj resendis la formularon el LM39 vidos siajn telefon- kaj faknumerojn sur sia adresetikedo.

Enhavo

Anoncitaj aranĝoj	3
Raportoj pri komercaj vojaĝoj	4-7
Komercaj petoj kaj proponoj	8-9
Microsoft MS-DOS, versio 6: taŭga por Esperanto ?	10
Normigitaj formularoj por komerco	10

La Merkato (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun (FJB), Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert (RR), Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert (FXG); D-ro Marco Picasso; S-ro Seikō Yamasaki; S-ro Daniel König (dk).

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo: Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado: Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono+fakso: +32.(0)50.330004.

Redaktora sidejo: Ĉe s-ro Daniel König, Speyerer Str. 80, D-68535 Neckarhausen, Germanio; telefono + fakso +49.(0)6203.2765.

La jara membreca kotizo estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

Kontoj: Ĉe UEA kaj FEL, kodo ikef-c, kaj belga poŝtĉekkonto 000-1592629-83.

Perantoj:

Cinio: S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an

Francio: S-ro François-Xavier **GILBERT**, F-55000 Longeville en Barrois (CCP 1275-89 L Nancy)

Germanio: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-W-7580 Bühl 16 (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hispanio: S-ro Pedro Antonio **MACANAS VALVERDE**, Av. Libertad, 6-2, E-30009 Murcia (Banco Hispano-Americano 0049, Asoc. Grupo Esperantista "Ricardo Coderniu", n-ro 672-1; Kotizo: 1.250 ptas.)

Hungario: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

Italio: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Japanio: S-ro **YAMASAKI** Seikō, J-185 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12 (pĝk. n-ro Tōkyō 6-253232, kotizo 1400 enoj)

Pollando: S-ro Maciej **PIEGAT**, ul. Dantego 1-B/48, PL-01-914 Warszawa

Jugoslavio: S-ro Sotir **TALESKI**, ul. 'Oslo' br. 12, YU-91000 Skopje

Togolando: S-ro Gbeglo **KOFFI**, B.P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé

Anconcitaj aranĝoj

Tallin - 2-4 julio 1993

Esperanto-Asocio de Estonio (EAE) okazigos internacian regionan renkontiĝon en Tallin. Oni pridiskutos la situacion de la Baltaj landoj kaj la eblecon de regiona (Balta-Skandinava) kunlaboro.

Loĝado en studentaj ĉambroj kostas 10 usonajn dolarojn tage (pagendajn surloke). Informoj pri aliaj loĝeblecoj kaj aliĝoj: Jaan Ojalo, Narva mnt. 9-5, 0001 TALLIN, Estonio.

Esperanto en la 21-a jarcento

TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) kaj Orientfranca Esperanto-Federacio organizos kolokvon en MITTELWEHER (apud COLMAR) je la 16a kaj 17a de oktobro 1993.

Je sabato okazos prelego kaj debato pri ekonomika temo. Dum la kolokvo oni ankaŭ planas prezenti la rezultojn de nun farita komerca analizo de Unuiĝo Franca por Esperanto.

Informoj: Edmond LUDWIG, 26 Rte de la Schlucht, F-68140 STOSSWIHR; telefono 89.77.52.56, fakso (TAKE) 89.79.79.93.

Edukiga seminario en Prago - novembro 1994

IKEF-membro Petr CHRDLÉ (171 - vidu ankaŭ rubrikon "komercaj petoj...") deziras fine de 1994 organizi altnivelan seminarion, dum kiu prelegos personoj kiuj havas pruvitajn konojn pri ekonomiaj temoj. Proponoj estas bonvenaj.

Germanaj legantoj kiuj jam komunikis la novan poŝtkodon kiu validos ekde julio, vidos ĝin sur la adresetikedo inter []. Bonvolu kontroli !

Komerca vojaĝo per Esperanto en Eŭropo...

Kiel Esperantisto, mi aplikas Esperanton en miaj komercaj agadoj jam ekde la jaro 1973. La establiĝo de IKEF en la jaro 1984, donis al mi pli multajn okazojn. Ekde tiam mi komencis interkorespondi pri komercaj aferoj kun s-ro F.J. Braun, aĉetsekciestro de Robert Bosch GmbH, Germanio. Je la komenco de komercaj rilatoj kun s-ro Braun, mi frontis malfacilaĵojn, eĉ malsukceson, ĉar varoj menditaj de Bosch devas atingi altan kvalitnormon. S-ro Braun pacience kaj samideane instruis min kiamaniere fari la kvalitkontrolon. Dank' al Esperanto, ni povas kompreni unu la alian sen lingva baro.

En aprilo 1993 mi faris unusemajnan komercan vojaĝon en Germanio kaj Belgio. En Bühl, Germanio, mi vizitis Bosch Kompanion kaj parolis kun s-ro Braun pri komercaj aferoj, kompreneble Esperante. Vespere ni havis kunvenon kun gesamideanoj el Oberkirch, aranĝitan de s-ro Braun.

En Belgio, mi tranoktis du noktojn en belega urbo Brugge. Konatigite de s-ro Rotsaert mi tie renkontis s-ron Walter Van den Kieboom kaj s-inon Flory Witdoeckt kiuj loĝas en Oostende. Dimanĉe frumatene ambaŭ venis al Brugge kaj kun s-ro Rotsaert ni vizitis la vidindaĵojn de la urbo. Posttagmeze ili akompanis min al Oostende, ankaŭ belego urbo.

S-ro Van den Kieboom kaj s-ino Witdoeckt scias multe pri komerco kaj industrio, kaj ankaŭ pri kvalit-zorgo de varoj, kiu estas la plej grava afero por fari komercon kun okcidentaj landoj. S-ino Witdoeckt donis al mi kopion de sia prelego pri "Totala Kvalit-zorgo", farita en Qingdao, Ĉinio en aŭgusto 1992. Nur dum unu vespero, mi lernis multon por plibonigi miajn futurajn rilatojn kun okcidentaj landoj. Tiasence, mia vojaĝo ne nur estis komerca vojaĝo, sed ankaŭ stud-vojaĝo.

La sekvantan tagon ili akompanis min al komerc-industri-ĉambro en Brugge. Poste ni vizitis kvin grandajn entreprenojn. Nur dum unu tago, kaj en urbo tute fremda al mi, mi faris kontaktojn kun kvin entreprenistoj, tute ne kredebla ! Poste mi tranoktis en Leuven. Alveninte en la hotelo, la servistino diris al mi ke iu sinjorino alvenis kelkfoje al la hotelo kaj ke estas mesaĝo por mi. Tio estis ne atendita! Mi pensis ke en Leuven mi ne povos renkonti kun samideano. Eksciante la telefonnumeron de s-ino Leona Meurrens, mi

telefonis al ŝi. Evidentiĝis ke ŝi estis informita de s-ro Van den Bempt. Mi esprimas dankon al s-ro Van den Bempt kiu zorgis pri mia vojaĝo kaj al s-ino Meurrens kiu akompanis min al la vidindaĵoj de la bela universitata urbo.

Konatigite de s-ro Braun, mi vizitis Robert Bosch Produktie N.V. en Tienen, Belgio. S-roj Engelen kaj Apeltant akceptis min kaj diskutis pri ebleco de komercado inter ni. Ili donis al mi listojn kaj desegnaĵojn de la bezonataj varoj. Kvankam ni interparolis angle, tamen mi nur povis havi tiun okazon pere de interkonigo de samideano. Miaj konatuloj en Hongkongo ofte demandis min: "Kial via malgranda kompanio povus komerci kun tiuj grandaj kompanioj ?" Mi nur diris: "Lerninte Esperanton, vi povos imagi la aferon, alie, ne estas imagebla !".

Mi havis ideon ke angla lingvo estas internacia lingvo, sed mi eltrovis ke en Eŭropo ĝi ne estas tute akceptebla. Survoje en Bruselo mi demandis angle al iu sinjoro pri la direkto, kaj tiu sinjoro kapneis sen paroli eĉ unu vorton. Poste mi demandis iun fraŭlinon "Ĉu vi parolas Esperanton?". Ŝi diris: "Esperanto ?" kaj neas, tamen daŭrigas la interparolon nederlandlingve. Mi juĝas ke ŝi demandis min kion mi bezonas; mi respondis esperante ke mi iras al flughaveno kaj ŝi akompanis min al stacidomo por la flughaveno. Ŝia ĝentileco pruvas ke ŝi scias ion pri Esperanto kaj favoras Esperanton. Malgraŭ ke ŝi ankoraŭ ne lernas Esperanton, ŝi agis kiel samideanino.

LEE Teck Shiu (IKEF 11)
ESPERO ENTERPRISES, G.P.O. BOX 11992, HONG KONG

Postskribo de Flory WITDOECKT

Mi tre ĝojis ke mi povis helpi al sperta komercisto. Malgraŭ la tre mallonga prepartempo, en ĉiuj vizititaj entreprenoj senprobleme ekestis utilaj kontaktoj.

FW

... kaj en Ĉinio kaj eks-Sovetio

En 1991 helpe de Esperanto venis du grupoj el Krasnojarsk kaj Moskvo, Rusio, ĉefe por kulturaj aferoj en Xi'an, Ĉinio. Kompreneble, al tia afero mankis mono ! Por ricevi monhelpon ni kontaktis iujn fabrikojn kaj konstatis ke fabrikoj ne interesiĝas pri kultura afero, sed jes pri internacia ekonomia aktivado pere de tio. Ili diris ke ili

volas akcepti per sia mono fremdan ekonomian-komercan grupon.

Post vasta korespondado, samideano el Litovio proponis reciprokan viziton. Unue, nia flanko akceptu grupon kun 8 personoj el Litovio. Laŭ la interkonsento en la grupo estu esperantisto kiel interpretisto. Fakte, en la Litova grupo estis du spertaj esperantistoj kaj unu komercantino. Post alveno de la litova grupo en nia urbo Xi'an ni venigis pli ol 40 entreprenojn por fari rektan kontakton. Ankaŭ estis intervjuoj kun urbaj ĵurnalo kaj televida stacio.

Post la sukcesa aranĝo nia lingvo jam havis prestiĝon kaj iuj grandaj firmaoj kontaktis nin por fari similan kontakton. Post korespondado ni ricevis intereson al Bulgario, Uzbekio, Armenio, Moskvo kaj Rostof-Don en Rusio. Al ili ĉiuj nia registaro, organizoj kaj kompanioj sendis la oficialajn invitilojn certigantajn ke ni pagos tutan elspezon por restado en Ĉinio. Kompreneble, la invitiloj estis skribitaj en Esperanto kaj ĉina lingvo.

Bedaŭrinde finfine nur venis malgranda delegacio el Samarkando, Uzbekio. Kvankam la delegacio estis malgranda, tamen la kontakto estis tre sukcesa, ĉar la Uzbeka esperantisto Ionesov Anatolo estas tre sperta. Ĉifoje pli ol 30 aliĝis al la kontakto. Mi klarigu ke laŭ nia kutimo ili ĉiuj devas pagi sufiĉe altan kotizon por limigita kontakto aranĝita de nia servo, ĉar ni pretigis interpretistojn kaj kunsidejon.

Ĝenerale interpretisto esperanta estas pli sperta kaj konvena ol aliaj, ĉar la ĉinaj interpretistoj ĝenerale ne havas travivon en la patralingva lando kaj tiel dialekto kun specialaj vortoj kaj esprimoj ĝenadis ilin.

Aliflanke, kvankam ni akceptis nur du grupojn, tamen pro nia bona organizo ni sendis al rilataj landoj 7 ekonomiajn-komercajn delegaciojn kun pli ol 60 personoj. Mi mem gvidis unu delegacion kun 13 personoj al Samarkando, Uzbekio. Tie nia aktivado estis sukcesa. Iu fama esperantisto demandis min ĉu la registaroj agnoskus Esperantojn kiel oficialan lingvon por kontrakto aŭ invitilo. Mi respondis ke mi ne scias tion, sed ke niaj invitiloj en Esperanto estis stampitaj kun la registaraj sigeloj kaj ke per tiaj invitiloj ni ambaŭ ja facile ricevis la oficialajn pasportojn.

WANG Tianyi

En 1994 la 79a Universala Kongreso okazos en Koreio.
Tiu Seula kongreso - la tria UK en Azio - povas esti
turnopunkto por nia movado.

S-ro LEE Jung-kee, direktoro de la Seula Esperanto-
Kulturcentro, situanta en centra parto de Seulo,
volonte helpos por informi vin pri Koreio.

Adreso: CPO Box 3047, 100-630 SEOUL, Korea.
Telefono: 82-2-779-5936; telefakso 82-2-756-4859.

Komercaj petoj kaj proponoj

Belarusj

Marmor, diamanta polvo; komputilaj sistemoj kaj programoj (dBase-tipaj); medicina spertoscio; kunlaboro tra komunaj entreprenoj. "PVS", V.P. Prjaĥin, str. Kalinovskogo 46-59, 220086 MINSK; telefono (0172) 630-865, fakso (0172) 260-530.

Ĉeĥio

Organizado de kongresoj kaj festoj; eldonado de scienca kaj faka literaturo; perado kun Ĉeĥio; servoj de vojaĝoficejo. KAVA-PECH, s-ro Petro CHRDL (IKEF 171), Anglická 878, CZ-25229 DOBŘICHOVICE (Praha), tel./fakso ..42-2-201641.

Ĉinio

Importo kaj eksporto de teksaĵoj, agrikulturaĵoj, forstumado, aŭtopecoj, diversaj metaloj kaj maŝinoj, k.a. CEKA, Liu Jianguo, Jiangong Dasha 802 Shi, Wuhu Lu 81 Hao, Hefei, 230001 ANHUI; telefakso 551-243091.

Ningboa Esperanto-Asocio (LM39, p. 6) havas novan adreson: p.a. s-ro Bao Shu-Jun, Wang Ai Xin Cun 1-2-102, CN-315040 NINGBO ZHEJIANG, tel. (0539?) 338639.

Litovio

Komercado de aŭtoj kaj partoj de aŭtoj. Terenoj (6 ha ĉe grava vojo, apud lago, 30 ha malproksime de vojo) por turismo aŭ agrikulturo. Turismaj servoj kaj perado. S-ro Stasys KRUZINAUSKAS, Birutes 4-31, 4270 VILKAVISKIS. Tel. 52989.

Portugaliao/Svedio

Vendas apartamenton en Tavira, Portugaliao. S-ro Gunnar Börjesson, Marklandsgatan 65 VII, S-41477 GÖTEBORG, Svedio. Tel. 46-31-412927 (esperante, svede, angle).

Ukraino

Metala zinkigita reto; najloj; lignaĵo ronda (60-80 USD/m³); ovoj, ova pulvoro; kazeino; sekigita lakto... Anstataŭ monpago estas akceptata varinterŝanĝo. S-ro Petro Ĥarkavyj, "TTF", ab.k. 83, UA-282001 TERNOPII; fakso (03522) 3 11 02.

Donacoj

La kasisto dankas pro jenaj ricevitaj donacoj:

- Bühl (D) 412 BEF	- Dengler (D) 206 BEF
- Martinez (F) 300 BEF	- Poupeau (F) 200 BEF
- Lee (HK) 1.099 + 1.550 BEF	- Rapley (BL) 193 BEF

Novaj aliĝoj

Dum la pasintaj du monatoj ni povis registri nur unu novan membron. Tamen, jam venis letero en kiu simpatianto anoncis ke li iĝos dumviva membro okaze de la Universala Kongreso.

174. S-ro Gunnar BÖRJESSON, Marklandsgatan 65 VII, S-41477 GÖTEBORG, Svedio

Komuniko al legantoj kiuj ne jam aliĝis al IKEF

La kasisto proponas al personoj kiuj nun (meze de la jaro) deziras aliĝi, ke ili pagu kotizon por 18 monatoj, t.e. ĝis fino de 1994. La sumo estas 600 belgaj frankoj, 30 germanaj markoj, 15 usonaj dolaroj, aŭ egalvaloro.

IKEF serĉas...

...fakulon kiu kapablas kaj pretas desegni IKEF-reklamo(j)n por la E-gazetaro.

Microsoft MS-DOS, versio 6: taŭga por Esperanto ?

Mi ĵus aĉetis la lastan version de tiu operacia sistemo por IBM-kongruaj personaj komputiloj. Mi konstatis ke en ĝi estas novaĵo ne menciita en la reklamo de Microsoft. Temas pri slava (orienteŭropa) karaktraro (kun modelaj klavaroj de pluraj orienteŭropaj landoj) kiu enhavas diversajn superkaj subsignojn, i.a. la esperantajn.

Laŭ la klarigoj de la libro kiu akompanas la programon, eblas instali la komputilon tiel, ke la uzanto povas rapide iri de unu klavara ŝablono (ekzemple usona) al alia (ekzemple hungara, uzebla por Esperanto). Mi dum kelkaj horoj eksperimentis sed ne atingis rezulton. Ĉu eble inter la legantoj estas fakulo jes sukcesis kaj povas konsili (ekzemple kiel adapti *config.sys* kaj *autoexec.bat*) ?

RR

Normigitaj formularoj por komerco

En LM40 (p. 18) s-ro Staszewski menciis la bezonon je internaciaj komercaj dokumentoj por importo-eksporto. Nia membro Kees Ruig (NL) sendis broŝuron kun modelaj formularoj, el kiuj mi kopias unu (mendilon) sur la apuda paĝo. Jen la traduko de la tekstoj laŭ horizontala sinsekvo de la fakoj: *Aĉetanto; MENDILO; dato de mendo; numero; referencoj; liveranto; livera adreso; lando de origino; transportinformoj; liveraj kaj pagaj kondiĉoj; markoj, priskribo; liverdato; nombro; prezo; sumo.* La suba parto estas libere disponebla.

Ĉiuj modelaj dokumentoj (fakturo, dogandeklaro, konfirmilo...) havas similan strukturon (laŭ ISO-normo 6422). La broŝuro estos konsultebla dum UK en Valencio.

La respondecaj organizoj troviĝas en Svislando:

* UN/ECE (Unuiĝintaj Nacioj - Ekonomia Komisiono por Eŭropo)
Trade Division, Palais des Nations, CH-1211 GENEVE 10

* ISO (Internacia Organizo por Normigo), Case Postale 56,
CH-1211 GENEVE 20

RR

[fotokopio]

[lasta paĝo]